

Gazeto Andalusia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

11-a Jarkolekto ☒ Junio, 1994 ☒ N-ro 38



GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D. JOSÉ GARZÓN RUIZ en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto. REDACCIÓN: Armengual de la Mota, 33, 4º D, 29007 Málaga. DIRECCIÓN POSTAL: Apartado de Correos 864, 29080 Málaga.

DEPÓSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPISERVIC, c/ Panaderos, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO, José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ.

GRÁFICOS: Raquel MARTÍN TOVAR y fondo informático de AEU.

ENHAVO

Efika Esperantismo / 5	3
Solvo al la krucvorto	4
Skolta agado en Esperanto	5
Tiuj, kiuj estis tiam	6
La Plenumo	7
Esperanta Muziko	8
Poezia Angulo	10
Krucvortoj	12
10 Sciindaj aspektoj pri...	13
<i>Translimen!</i>	14
Alvoko al Asambleo	15
IJS'94	16
Esperanto-TV-Kurso	17
Zeúso parolas Esperanton	18
Financa raporto de AEU	20
Spekulaciistoj	21
Esperanta PEN-Klubo	22
$E = mc^2$	23
Esperanto Aplikata	24



Jen bukedo alirebla al niaj legantoj.

Vi trovos aplikadon kaj teorion, seriozaĵojn kaj amuzaĵojn, prozon kaj poezion, arton kaj ekonomion, politikon kaj beletron...

Ĉu GAZETO ANDALUZIA plaĉas al vi? Ĉu ne? Mi ne konas vian opinion. Ĉu vi sciis ke pluraj artikoloj originale verkitaj por GAZETO ANDALUZIA publikiĝas poste en EVENTOJ?

Kiel AEU-anon interesas vin koni la alvokon al asembleo kaj la financon raporton de AEU. La venontan julion alestu al Malago. Rendevuu en ĉi tiu mediteranea urbo!

La Direktoro

Efika Esperantismo / 5

De Andaluzio en 1492 Kristoforo Kolumbo eliris por malkovri Amerikon kun la intenco atingi malpli longan vojon al Hindio. En 1498 Vasko de Gama trovis la orientan vojon al Hindio ĉirkaŭante Afrikon. En 1521 Magallanes pruvis per faktoj la rondecon de la Tero. En 1521 Kortes kaj en 1532 Pizaro eltrovis amerikajn civilizaciojn antaŭajn al la malkovro kaj ilin politike detruis. Tiujn personulojn sekvis Koperniko, kiu intuis, ke la planedoj kaj eĉ la Tero ĉirkaŭas la Sunon. Resume, la homara civilizacio planediĝis kaj estis la unuan fojon en la tuta historio spertante tion.

De Eŭropo deiris navigantoj, aventuristoj, militistoj, ekleziuloj... kaj de tiam la tuta Tero estas konata kaj neniu lando restas izolata.

Kaj alvenis alfrontiĝoj de regnoj, popoloj kaj eĉ de kontinentaj civilizacioj kaj la evoluo de la socio ne estis trankvila: konkeraj militoj, interregnoj kaj kiel ĉiam daŭris tribaj militoj en Afriko. Oni ignoris la novajn cirkonstancojn. Tiele disvolviĝis la historio kaj ni certe ne povas akuzi kiun ajn, la afero iradis kiel iradis, eble kiel la plej probabla laŭ la tiamaj cirkonstancoj kaj la tiamaj pensmanieroj. Se estus, por ekzemplo, Ĉinio aŭ Hindio aŭ eĉ Ameriko la tiamaj plej disvolviĝantaj landoj, la afero estus povinta iri inversen, kaj esti la eŭropanoj la konkeritoj. Tiam nur la superaj religioj ekumenaj, kiel la kristanismo mem, kiu konsideris ĉiujn homojn kiel idaron de la geparo Adamo kaj Eva, povis koncepti la homaron entute. Dum kvar jarcentoj la homaro laŭ materiala vidpunkto planediĝis, sed ankoraŭ unu kontinento povis travivi unu aparta de la alia. Eĉ militoj en Eŭropo ne tuŝis tutan Eŭropon. Dum la milito de Krimeo inter Rusio kaj Turkio, kun alianco de Anglio kaj Francio, disvastiĝis la onidiro *Akvo, suno kaj milito en Sebastopolo*, ĉar tiu milito donis efemeran prosperon al Hispanio.

Kaj la planediĝo daŭrigis. La Unua Mondmilito en 1914 fariĝis ĝenerala. La homaro entute jam eniris en la planedan eraon kaj des pli multe en la Dua Mondmilito. Ni ĉiuj jam troviĝas en la atoma epoko. Se eksplodus ĉiuj gardataj atombomboj la mondo pereigus, tiel same la malbonuloj kiel la bonuloj, tiel same saĝuloj kiel analfabetoj, tiel same regantoj kiel regatoj... kaj eĉ la plejmultaj indiferentuloj. Ni ĉiuj jam estas samsortuloj, ĉu por la bono, ĉu por la malbono, ni ĉiuj havas la saman destinton.

La homo atingis paŝon sur la Luno kaj mense ni troviĝas kvazaŭ ni vivus sur la Luno. La homoj priokupiĝas kaj eĉ batalas por bagatelaĵoj. La materialan unuiĝon de la mondo ne sekvas la spirita unuiĝo de la homaro. Jen la civilizacia krizo de nia tempo.

Antaŭ tiaj cirkonstancoj preskaŭ neniu faras al si tiun demandon: kion fari? Oni preferas sin distri por ignori tiun demandon. Tamen la respondo ne estas facila. Okazas, ke la nuna antaŭenirado de la historio estas la ĉiama, sed la cirkonstancoj estas tute aliaj, kaj aliaj devas esti la faktoroj, kiuj impulsas la historion. Ĝis nun ili estis senkonsciaj, kaj tiele iradis la historio. Nur konsciaj faktoroj povas mildigi la drastecon de la historia disvolviĝo. La pasinta historio havis kiel precipajn faktorojn la hazardon kaj la neceson kaj malmulte influis sur ĝin nek la homa volo nek la homa konscio.

Pere de la volo ni povas impulsi nian propran perfektigon kaj tiel same tiun de la socio. Sed

tio ne fariĝos tuj laŭ demagogioj nek perforte, nek per mirakloj. Ĉiu konstruado estas klopoda kaj peniga, des pli la alkonduko de humana homarunuigo. La agado devas daŭri tagon post tago, jaron post jaro, ĝis tiu fariĝos komuna volo, ne kiel romantikisma revo, sed kiel deviga devo.

Se oni nomis la antaŭan dekokan jarcenton la jarcento de la lumoj, nian baldaŭ forpasontan dudekan jarcenton oni nomos la jarcento de la nigraj mallumoj. Du mondmilitoj vipadis ĉiujn. La iluzioj de perfortaj revolucioj promesantaj la feliĉon disfalis en mizeran kaj tragikan elreviĝon. Kaj la homoj sen orientiĝo, unuaj mergiĝas en la plej bastan materialismon kaj aliajn en la plej fanatikajn fundamentismojn.

La materialaj ligiloj, la komerco, la aviado, la vojaĝoj kaj eĉ la televido, permesas unuafoje sin senti mondanoj, sed oni reakciis per la plej disigaj kaj alfrontantaj naciismoj, kies lasta rezulto estus reveno al triba malkunvivado.

Estas nepre necese disvastigi kaj ĝeneraligi la komunajn konscion, ke la defio de nia nuntempo estas konstrui unuecan humanan homaron. Estu kiuj ajn niaj religiaj kredoj, niaj politikaj kriterioj kaj eĉ niaj sociaj kontraŭantaj klasoj, super ĉiuj ĉi diferencoj kaj eĉ kontraŭaj intereso, super ĉio ĉi, kiel solidaraj al komuna destino, oni devas partopreni en la komunan taskon konstrui homaron kiel *Unu grandan rondon familian*: tio ne estas io alia ol la *interna ideo de la esperantismo*, kaj kiel ilo de agado, la supernacia lingvo Esperanto.

Giordano Moya



Lotume gajnis librojn ĉifoje niaj
gesamideanoj Pedro José
Gosálvez, el Kordovo, kaj
Lourdes Molina, el Almodovar,
Kordovo, kiuj baldaŭ ricevos
siajn premiojn. Gratulon!

Skolta agado en Esperanto

Fakaj organizoj vastigas la terenon de Esperantuzado:

En oktobro 1993 pasis 75 jaroj de kiam Alexander William Thompson skribis libreton *Propono pri Skolta Esperantista Ligo*. Tio estis la komenca paŝo por la kunligo de du grandaj idealaroj, la skolta kaj la Esperanta. Tio naskis la Skoltan Esperantistan Ligon, ekde 1972 nomatan Skolta Esperanto-Ligo. La unuaj jaroj estis sukcesaj kun internaciaj SEL-tendaroj, kaj pinte en 1933 partopreno en la Monda skolta ĵamboreo en Hungarujo kun granda grupo de Esperantoparolantaj skoltoj. Sed la kondiĉoj ne estis favoraj por SEL. La monda skolta organizo praktike malpermesis la uzadon de Esperanto en 1934. "Ĉar Esperanto ne havas praktikan valoron" la organizo decidis "ne rekomendi" la lingvon al siaj membroorganizoj. Tiun rezolucion oni nuligis en 1964 kaj nuntempe la sinteno de la monda skolta oficejo certe ne estas malaproba, sed la kontaktoj estas malmultaj, ĉefe pro la malforto de Skolta Esperanto-Ligo.

Dum kelkaj jaroj estis granda krizo en SEL. ravaj funkciuloj kiuj dumlonge laboris devis ekŝiĝi. Estis problemoj trovi novajn fortojn. Tiu krizo estis jam plejparte venkita kiam mi komencis redakti la organon de la Ligo *La Skolta Mondo*


fine de 1992, eĉ se daŭre ni serĉas novan ĝeneralan sekretarion kaj pliajn novajn aktivulojn.

Aktiva agado

Okazas internaciaj SEL-tendaroj. Jam okazis plurnaciaj SEL-tendaroj SKOLTO'91, '92 kaj '93. Okazis ankaŭ aliaj SEL-aranĝoj en diversaj landoj. Kaj ŝajnas ke la evoluo ne stagnas. Ekzistas planoj ankaŭ por 1994. Kiel redaktoro estas ĝojige ricevi raportojn pri lokaj SEL-grupoj el la tuta mondo. Okazas kursoj laŭ la skolta lernolibro *Ĵamborea Lingvo*, kiu baldaŭ aperos en renovigita eldono. SEL planas aktive partopreni la grandajn skoltajn tendarojn en Nederlando 1994 kaj 1995, la Eŭropa kaj Monda ĵamboreoj.

Internacia dimensio al la agado

Por mi, antaŭe tre aktiva skoltino, poste tre aktiva Esperantistino, la SEL-tendaroj estis mirindaj travivaĵoj, Esperanton ni ne uzis nur ĝenerale por uzi Esperanton, por umi



**Skolta
Esperanto-Ligo**

kune ĝenerale. Esperanton ni uzis pro nia komuna intereso, pro skolteco kaj niaj aktivecoj estis tradicie skoltaj. Esperanto estis por ni bongustiga spico, kiu donis profundan internacian etoson. Certe ne nur SEL, sed ankaŭ multaj aliaj fakaj organizoj povas atingi la samon. Esperanto atingas homojn kiuj ne interesiĝus nur pri la ĝenerala Esperanto-movado, ĉar Esperanto donas plian, internacian dimension al la jam kutima agado.

Speciala Jubilea Numero

La Jubilean Numeron de *La Skolta Mondo* vi povas ricevi kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, mondonaco (uea-konto selx-m), aŭ eĉ senpage skribante al la redaktorino: AM Ritamäki, Peltolavägen 6B 36, FIN-20720 ÅBO, Finnlando. En ĝi aperas informoj pri la historio de SEL, sed ankaŭ pri la nuna agado.

Anna Margareta Ritamäki

Tiuj, kiuj estis tiam

Ĉi-jare, la Kongreso okazos dum la Somero, de la 17a ĝis la 21a de Julio, kaj denove en Malago. Tiuj el ni kiuj laboras ene de la Esperanto-Movado jam de antaŭ kelke da tempo scias ke kongresi kutime signifas turismi, diboĉi kaj iomete labori. Tamen, ĉi tiaj kunvenoj povas ankaŭ faciligi la renkontiĝojn de personoj kiuj izolite sukcesigas preskaŭ nenion, sed kunaj kaj organizataj kapablas konstrui ion pozitiva.

Ĉi ĉio mem okaziĝis antaŭ 12 jaroj tie en Malago, okaze de alia Hispana Kongreso de Esperanto, mi memoras pri ĝi perfekte, mi ĉeestis. Tiu kunveno elstariĝis sendube pro la fakto, ke tie grupo da andaluzoj ĝis tiam izolitaj, konscienciĝis pri la neceso eklabori por la disvastigo de la internacia lingvo. Kaj ni iomete sukcesis, naskiĝis Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, oni ekeldonis *Gazeton Andaluzian* kaj oni organizis daŭre kursojn kaj kunvenojn. Kaj ĉi ĉio eblis ĉar ni kontaktis okaze de konferencoj aŭ pli kutime en la koridoroj, salonoj kaj ofte en la trinkejoj apud freŝa biero kaj ĵus friktitaj fiŝaĵoj.

Sed mi ne deflankiĝu, ĉi tiuj linioj ne volas esti omaĝo al la nostalgio. Per ili mi nur pretendas memori ĉiujn andaluzojn kiuj tiame, en 1982, ĉeestis la Malagan Kongreson. Preskaŭ ĉiuj el ni, nur kelkiujn mi esceptas, estis apenaŭ deksep- aŭ dekok-jaraĝaj knaboj, kompreneble senlaboraj kaj pro tio sen ekonomiaj rimedoj kaj ĉefe studentoj. Sed malgraŭ tio, kaj kun la kunlaboro de aliaj pli aĝaj, ni atingis organizi la movadon ĉi tie en Andaluzio.

Hodiaŭ, en 1994, dek du jaroj poste, ni ne estas tiel knabaĝaj, multaj el ni jam finis studi kaj iuj laboras, krome al tiuj komencantoj aldoniĝis pliaj personoj kiuj alportis sian laborkapablon. Pro tio, ni devas pensi ke se en la jaro 1982, kaj dum la ceteraj jaroj, ni estis kapablaj revii, kaj eĉ realigi multajn revojn, nunjare, en 1994, apertiĝas nova jararo, dum kiu ĉiuj povas partopreni, ankaŭ tiuj kiuj estis tiam, sed ili hodiaŭ kun plia sperto, libereco kaj deziroj reorganizi la movadon en Andaluzio.

J.M.R.H.

La Plenumo

Teksto de William Auld

Muziko de Crawford Dates


Maestoso ♩ = 90 100



En ĉi - u lan - do, ĉi - u ŝta - to,
La maj - stra re - vo es - tis pra - va,
Na - ci - oj de la mond', a - ten - tul



de - di - ĉi - te kaj de - fi - e. Tro - vi - ĝas la ko -
dis - vol - vi - ĝis la re - a - lo; Ne va - na es - tis
Pa - ca kun - la - bo - ro e - bias, Sen om - broj de su -



nan - toj de l' ko - mu - ni - ki - lo ho - ma;
fid' de l' pl - o - ni - roj kaj mar - ti - roj,
spek - to ne - kom - pren' kaj vort - ob - sta - klo:



Ni a - van - gar - das - mon - don, ki - a la ho - ma - ro
Ĉar ni ho - di - aŭ a - mi - ki - ĝas u - nu - ling - ve en e -
En ma - te - ni - ĝo de la mon - do, ni - a ar - da flam' ne -



ĉi - e, Pa - ro - los sen - ka - te - ne en ko - mu - no
ga - lo, Kaj sper - tas ju - bi - lan - te ple - nu - mi - ĝon
te - bias, Sed tu - mas jam kon - stan - te ki - el sig - no



I - di - o ma - rit.
de l' as - pi - roj
de l' mi - ra - klo

Esperanta Muziko

Kiel sciante, ĉiu lingvo, bezonas aplikadon por pluvivi kaj evolui. Parolante pri aplikado, ne malofte oni pensas ke literaturo kaj ĉiutaga konversacio sufiĉas, forgesante ke aliaj lingvaj esprimoj rajtas saman atenton kaj kulturon fare de la esperantistaro. Unu el tiuj kazoj estas la muziko kun teksto.

Muziko estas la arto esprimi sentojn per harmonia aranĝo de sonvibroj kaj, tial, nature, ĝi estas universala. Same okazas, ekzemple, en la kino (la muta kino), la skulpturo, la fotografio kaj ĝenerale en ajna bilda arto. Nu, kial la teksto? Ĉar la parolo kapablas aldoni ion kio povas helpi kompreni la samtempan mesaĝon de la bildoj, kaze de la kino, aŭ de la sonoj, kaze de la muziko.

Bonsorte, en Esperantio abundas muzikaĵoj kun tekstoj jen originale verkitaj en E-o, jen tradukitaj el aliaj lingvoj. Tamen, bedaŭrinde, ankoraŭ multaj samideanoj apenaŭ scias pri ili. Jen iuj tiurilataj sciindaĵoj pri la temo deprenitaj ĉefe de la revuo *Rok-Gazet'*, eldonita de Euroka en E-o.

Projekto

Vinilkosmo planas produkti gravan kompilaĵon kasede kaj kompakt-diske. Partoprenos, krom neesperantaj rokbandoj kiel Les Ablettes (La Alburnoj), The Fabulous Troubadors, Tutti Frutti, Zahra kaj E.V., esperantaj grupoj kaj muzikistoj kiel Rozmariaj Beboj, Bruemaj Najbaroj, Amplifiki, Persone, Vladimir Soroka, Andreo kaj Natalija Berce, Blus-Haltejo, Kajto, Jomart kaj Nataŝa, Flávio Fonseca, Solo, Team', La Mevo, Pixamandurries, Akvo kaj Ĵak Yvart. Vinilkosmo deziras la partoprenon de multaj aliaj bandoj kaj kantistoj, inter ili, Torino, Kredo, Sen Nomo, Akordo, La Bleka Fortikulo, Espero, Roman Bura...

Tiu antologio de muzikaĵoj respelugos la aktualan rok-, pop-, folk- kaj kanzon-muzikon en E-o kaj celos prezenti diversajn E-artistojn. Ĝia antaŭvidita apero estos proksimume aŭtune 1994. Se oni antaŭmendas ĝin, oni atingas gravegan rabaton.

Aliaflanke, la konstanta helpo de SAT-Amikaro ebligas de antaŭtempe la okazigon de E-koncertoj en Francio. SAT-Amikaro jam dediĉis 4000 francajn frankojn (preskaŭ milionon da pesetoj) por ekfunkciado de speciala fonduso SAFT (SAT-Amikara Fonduso por Turneoj). Ĉu en Hispanio ne estas alia E-organizo kapabla fari ion similan?

La Radio

En la disvastigo de la E-muziko tre menciinda estas la kunlaboro de la radio en kelkaj landoj. *Rok-Gazet'* atentigas sian legantaron pri la jeno:

La programoj de Radio FMR (9 bis avenue Frédéric Estèbe, F-31200 Toulouse, Francio) estas ĉefe rokmuzikaj. La E-programo disaŭdiĝas ĉiu-vendrede de la 16a ĝis la 17a laŭ loka horo.

Radio 3 ZZZ (Multicultural Melbourne Radio, Esperanto-



Radio Programo, P.O.Box 1106, Cullingwood 3066, Melbourne, VIC, Aŭstralio) disaŭdigas ĉiuspecan muzikon. La E-programo okazas ĉiulunde de la 13.30 ĝis la 14.00 sur 92'3 Mhz FM.

Radio Esperanto Libertaire (145 rue Amelot, F-75011 Paris, Francio) dissendas en la pariza regiono ĉiuvendrede de la 18a ĝis la 19a sur 89'4 Mhz FM. Gvidate de Ives Peyraut, disaŭdigas regule E-muzikon.

Radio PINGVIN (Autoput 2, YU-11070 Beograd, Jugoslavio) dissendas sur 90'9 Mhz FM.

Radio Havano Kubo, Apartado 62-40, La Habana, Kubo, disaŭdigas E-muzikon en ĉiuj E-programoj. Por Eŭropo dissendas ĉiudimanĉe duonhoran E-programon je la 22a UTC, sur 17760 Khz.

ORF Radio Aŭstria Internacia dissendas ĉiudimanĉe 25-minutan E-programon ĉiam kun E-muziko. Tiu radiostacio dissendas por Eŭropo je la 04.05 UTC sur 6155 kaj 13730 khz, kaj je la 13.05 UTC sur 6155, 9870 kaj 13730 Khz.

Radio Pekino dissendas ĉiutage 30minutan E-programon, regule kun E-muziko. Loĝantoj en Eŭropo aŭskultas ĝin je la 20.00 kaj 22.30 UTC sur 7470 kaj 9965 Khz.

Pola Radio (Poŝtkesto 46, PL-00950 Varsovio, Pollando) dissendas ĉiutage E-programojn 25-minutajn por Eŭropo je la 14.30 UTC sur 6135, 7145, 9525, 9540 kaj 11815 Khz; kaj je la 21.30 UTC sur 1503, 5995 kaj 6135 Khz. E-muziko estas regule disaŭdigita.

Ĉe ni

Inter ni, krom la malaga muzikisto Solo, troviĝas Blus-Haltejo kaj Pixamandurries. Blus-Haltejo estas blus-rokbando el Eŭskio. La grupo ekiris en 1991 per la kuniĝo de José Rodríguez (elektra gitaro), Angel López (drumo), Javier Fernández ("Txubio", basgitaro) kaj John Robles (saksofono), kvar personoj kun similaj ĵaz-tendencoj. Poste aliĝis al la grupo Alfonso Andikoetxea. Espereble ĉi tiu grupo tre sukcesos en la venontaj jaroj. Kuraĝigu kaj faru proponojn skribante al Alfonso Andikoetxea Alonso, Plaza del Dantxari 5, 1 derecha, E-10006, Vitoria-Gasteiz (Alava).

Danke al la klopodoj de Nikolas Gil (cetero, membro de AEU) iu punkbando interesiĝis pri E-rokmuziko kaj pri Esperanto mem. Tiu muzikgrupo estas Pixamandúrries. Ĝi jam eldonis kasede albumon ĉe Masterdisk Produccions S.A., titolitan *L'any dels gossos* (La jaro de la hundoj) kaj la diskon *Quina vida* (Kia vivo) ĉe Picap Produccions. Joan estas la gitaristo-kantisto. Li eklernis Esperanton ĉar li emis kanti en ĝi: ŝajnas al li ke tiu lingvo tre taŭgas por la internacia komunikado sen limoj. Interesitoj turnu sin al Pixamandúrries, p/a Joan Artigas Alsina, Carrer Casavells 53, E-17121 Corcá (Girona).

Poezia Angulo

La Saeta

Ĵus finiĝis la Pasko en Andaluzio, la Sankta Semajno, kaj ankoraŭ ŝajnas ke el iu stratangulo eligas *saeta* kiu kantas al Kristo en lia agonio, pasio kaj morto. Sed kio estas la *saeta*? Kiu ilin kreis? El kie ĝi devenas? La *saeta* estas krio de fido kiu stariĝas en la noktoj de la andaluzia Pasko.

Sed ne ekzistas ia fidebla argumento kiu klarigas ĝia origino, kvankam ja diversaj opinioj. Por kelkaj, la *saeta* estas la laŭtvoĉa preĝo de la konvertitaj kristanoj kiuj deziris montri al siaj apuduloj sian ĵus agnoskitan fidon. Por aliaj estas la kontinuo, en la kristana epoko, de la preĝado de la muezinoj de la andaluziaj moskeoj. Tamen, la plej fidinda teorio estas tiu kiu asertas ke la *saeta* estas simila al la plendoj de la funebraj ĝemploristinoj, alĝustigitaj de la popolo pere de la cigan-andaluziaj kantoj okaze de la Pasko.

La *saeta* postulas facilan esprimon, sed samtempe elvokema, literara kaj direkta, rekta al la koro de la popolo kaj al la bildo de Jesuo en la Kruco aŭ la Virgulino en ŝia doloro. Sed ni ne sukcesos kompreni pri kio estas la *saeta*, ĉu kanto ĉu preĝo, se oni ne aŭskultas rekte, prefere dumnokte en andaluzia urbo, ĉe balkono kaj apud gorgo kiu deklamas, preĝas kaj kantas al la Pasio de Kristo aŭ al la doloro de Maria.

Turnu Vin, Maria,
rigardu vian filon Jesu'
ĉar li akcele venas
sub la pezo de la Kruc'

Sur senviva kaj sola roko
stariĝas nuda kruco.
Kaj en la brakoj de Maria,
morta en blanka tuko
estas Kristo en la Kalvario.

Tiam lignisto eltondis
inter junkoj apud fonto,
pezan kaj fortan krucon.
Kaj al la Kalvario ĝin portis
tiu senkulpa Ŝafo.

Estas pli bela Maria
ol la lilio en la kamparo,
ol la rozo en la rozujo,
ol la neĝo en la montaro.



LA LASTA POEMO

Ne plu la vivo sin prezentas
al mi sub bril' de hela sun';
kaj nun -kruela pun'- mi sentas
ke jam forflugis mia jun'.

Troa pasio, troa sento
estis turmento por la kor';
pro troa viv', troa silento,
ĝin skuis vento de dolor'.

De l' vivo sub la uragano
mi tremis, falis kiel kan';
iĝis Sufer' mia tirano
kaj min ekmordis la malsan'.

Aminte teron kaj aeron
mi restas nun en malliber'
kaj plene konas hommizeron
kaj la suferon de l' infer'.

Koninte nur vortojn kaj sentojn
de la spirita ama flam',
mi sentas nun nur la turmentojn
de venĝosent', besta malam'.

Ne plu mi trovas en mi rimon
por dolĉaj sentoj de l' anim',
ĉar buŝo ĵetas nur esprimon
pri krimo, ŝlimo, cim' kaj lim'.

En la malvasta kaĝo-ĉelo
homo-poet' ne kantas plu
kiel la birdoj en ĉielo
vidataj tra l' fenestro-tru'.


Akra, terura, la ĉagreno
de l' kor' al buŝ' ŝprucas en li...
lipojn sekigis viv-veneno...
formortis jam la Poezi'l

*Barcelona Malliberejo, decembro,
1934*

J. Grau Casas

J. Grau Casas (1896-1950) dum multaj jaroj estis redaktoro de *Kataluna Esperantisto*. Postrestis *Hispana antologio* en manuskripto. Ekzilita en Francujo, li verkis precipe *Amaj poemoj*, *Novaj amaj poemoj* kaj *La lasta poemo*. Ankaŭ estis redaktoro de *Kataluna antologio* (1925)

Krucvortoj



Horizontale:

1. Sako el ŝtofo por ke oni povu sin apogi sur ĝi. 4. Malmorti. 6. Arba malmola substanco. 7. Parto de la okulo. 9. Citrono. 12. Skandinava di'. 15. Malgranda. 17. Hibrido de azeno kaj ĉevalino. 20. Rondiro de ĉiu planedo ĉirkaŭ la suno. 23. Oficialan stampon sur pasporto. 24. Vundi per la dentoj. 25. Pli-malpli profunda malplenaĵo en la tero. 26. Neseksa reprodukta ĉelo de kelja animaloj.

Vertikale:

2. Pisi. 3. Gento. 4. Bona inklino de la animo. 5. Skota brand'. 8. Ŝtof'. 9. Inverse, prefikso. 10. Dekfoje cent. 11. Maljes. 13. Ne sci', ĉu io okazos aŭ ne. 14. Specio de frakseno. 16. Pasiva sufiks'. 18. Ununura. 19. Antikva greka monereto. 21. Statuo prezentanta homfiguran diaĵon. 22. Brila strio, kiu eliras el la suno kaj aliaj lumantaj korpoj.

La solvoj de la krucvorto lastnumera vi povas legi sur la paĝo 4. Vi denove povos gajni libron, se vi sendos al ni la solvon de la supra krucvorto. Ekl kaj sendu la respondon al la redaktoro, J.F. Martín del Pozo, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago, antaŭ la 15a de aŭgusto.

10 Sciindaj aspektoj pri...

... la esperanta gazetaro

- 1.- La unua Esperanto-revuo publikita estis la germana *La Esperantisto*, ekeldonita en 1899, nur du jaroj post la apero de la lingvo. La eldonado ĉesis en 1895 pro malpermeso de la rusa carista cenzuro (tiutempe la plejmulto el la esperantistaro loĝis en la Rusa Imperio).
- 2.- En Hispanio, la unua revuo estis *Esperanto, Revista Mensual Ibero-Americana*, eldonita en Santander en 1902 de Andrés Bravo del Barrio, kiu aperigis nur dek numerojn de la revuo.
- 3.- Post tiu unua hispana gazeto, multaj aliaj aperis, kiel kuriozaĵo ni mencias *La Mondon Karceran*, publikitan ekde 1911 en la malliberejo de Oviedo.
- 4.- En Iberoameriko la unua Esperanto-gazeto estis *Antaŭen, Esperantistoj*, eldonita en Peruo en 1903 de Francisko Villarreal, ĉi revuo aperis regule dum 10 jaroj.
- 5.- Hodiaŭ en preskaŭ ĉiuj landoj kie ekzistas Esperanto-organizo, aperas ankaŭ revuoj. Inter la plej ekzotikaj ni trovas *La Vjetnama Esperantisto* de Vjetnamo, *Montaro* de Nepalo, *Fenestro* de Hindio, *La Velo* de Islando kaj *Mezmara Stelo* de Malto.
- 6.- La asocio kie kunveniĝas la Esperanto-ĵurnalistoj estas TEĴA, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kiu siafoje eldonas la revuon *Internacia Ĵurnalista*. Interesa materialo pri kiamaniere eldoni Esperanto-revuojn estas atingebla ĉe ĉi asocio.
- 7.- La plej ofta internacia revuo estas *Eventoj*, kiu ekde 1991 aperas dusemajne. Oni eldonas ĝin en Hungario kaj temas pri aferoj rilataj rekte al la Esperanto-Movado. Ĝis nun la revuo plej regula aperanta estis *Heroldo de Esperanto*, fondita en 1920, kies numero, aperita antaŭ kelkaj semajnoj, estas la 1889.
- 8.- Sendube la plej altnivela Esperanto-revuo estas *Monato*, eldonita en Belgio, kaj kiu aperas, kompreneble, ĉiumonate. Ĝi ne estas esence Esperanto-gazeto, sed publikaĵo pri internaciaj aŭ naciaj aferoj, redaktita en Esperanto.
- 9.- La oficiala revuo de la Esperanto-Movado estas *Esperanto*, monata altkvalita gazeta, oficiala organo de UEA, kaj kie aperas preskaŭ ĉiuj interesaj novaĵoj rilate la internacian lingvon.
- 10.- Kiom da Esperanto-revuoj estas aŭ estis eldonitaj en la tuta mondo ĝis nun? Nu tiu estas ne-solvebla afero. Tamen, kelkaj Esperanto-arĥivoj posedas kolektojn de 1300 revuoj en la internacia lingvo.

J.M.R.H.

Translimen!

Trans la landlimoj naskiĝas la semajna bulteno informa kaj kultura pri la *Kampanjo de la Radikala Partio por la rajto je la internacia lingvo*.

Okaze de la malfermo de la Kampanjo de la Radikala Partio por la rajto je la internacia lingvo iniciatita de la Radikala Partio, ekde la unua semajno de januaro aperas dulingva semajna bulteno de informado, kulturo kaj profundigo pri tiu temo.

La bulteno, tradukita al pluraj lingvoj, kun paralela teksto en Esperanto, estos dissendata al Italio, al la eksa Sovetunio, al Francio, Belgio, Hispanio, Germanio, al la Eŭropa Parlamento kaj ĉien, kie ĝi estos petata.

La ĉefa celo de la iniciato estas liveri ĝustan informadon pri la politikaj iniciatoj de RP pri Esperanto.

Kiu deziras senpage ricevi la semajnan informilon pri la *Kampanjo de la Radikala Partio por la rajto je la internacia lingvo*, skribu al

"Esperanto" Radikala Asocio
Via di Torre Argentina 76
I-00186 Roma (Italio)

Jen artikolo el la unua numero de *Translimen!*:

La angla, ĉu internacia lingvo?

Ĉu Esperanto internacia lingvo?

Kial? Ĉu ne estas la angla la lingvo hodiaŭ al ni prezentata kiel la internacia lingvo?

Ĝi pretendas tion, sed estas utopio, ke ĝi estus tia pli ol Esperanto povus.

Hodiaŭ la angla estas la lingvo de teknologio, de scienco, de internacia medicino; oni povas diri, ke ĝi estis unu el la instrumentoj, kiuj ebligis progresojn en tiuj ĉi kampoj.

Sed kiom la averaĝaj homoj eŭropaj (kaj ne nur eŭropaj) kapablas senĝene konversacii kun homoj alilandaj, sen sento de kultura malplivaloreco, kaj povante fakte troviĝi en egaleca pozicio? Malgraŭ tio, ke la angla lingvo estas lernata en granda parto de la mondo, nur tre malgranda procento



da personoj kapablas mastri ĝin; kaj, kiam tio okazas, la homaj interrilatoj estas neeviteble filtrataj tra fremda kulturo: la riĉeco de la interŝanĝoj, de la renkontiĝoj de diversaj pensmanieroj, estas forte limigita de la uzado de fremda etna lingvo.

Tio ne okazas ĉe Esperanto, kiu estas artefarita lingvo, bazita esence sur hindeŭropaj radikoj, tre pli facile lernebla kompare kun la etnaj lingvoj, kiu, ĝuste ĉar ĝi estas artefarita kaj ne etna, ne subpremas per sia superrego pli malfortajn kulturojn.

Ĝi povas esti, por komenci, la lingvo de Eŭropo. La lingvo kiu servas al la Eŭropanoj (sed ne nur al ili) por komuniki.

Kaj krome la avantaĝoj de Esperanto kiel internacia lingvo estas pluraj: unue, ĝia lernrapideco ne estas komparebla al tiu de iu ajn etna lingvo (por perfekte koni Esperanton oni bezonas averaĝe 600 horojn da praktiko, kompare kun la 10000 horoj bezonataj por iu okcidenta lingvo); krome estas pruvite, ke lerninto de Esperanto povas poste pli facile ellerni aliajn lingvojn.

Oni ankaŭ pensu pri la grandega elspezado por tradukadoj kaj interpretadoj dum asembleoj, kongresoj, ene de internaciaj institucioj (ekzemple UNo, Eŭropa Unio...) kaj, kontraŭe, pri la neebleco de renkontiĝoj inter ordinaraj civitanoj diversnaciaj ne posedantaj samajn monrimedojn kiel tiuj internaciaj organizaĵoj. Evidente mankas la volo alfronti la problemon de la internacia komunikado: problemo de demokratio *lingva* unue, ekonomia kaj kultura poste.

Verŝajne politikaj, ekonomiaj kaj sociaj faktoroj, la malfidemo kaj la skeptikeco,

kiuj akompanas tiun ĉi lingvon ekde la jarcentkomenco, la timo, ke ĝi povus detrui la tradiciojn de malpli grandaj popoloj, la misinformiteco, tiuj ĉi kaj aliaj elementoj malpermesas, kaj ankoraŭ nun malpermesas, kaj la amasan uzadon de Esperanto kaj seriozajn studojn por dokumenti sin kaj taksu la efikojn de tiu ĉi lingvo; lingvo, kiu certe ne estas perfekta kaj ne konsistigas la definitivan solvon de la problemo, sed estas, hodiaŭ pli ol hieraŭ, la plej efika rimedo por atingi lingvokulturan kaj socipolitikan ekvilibron.

Mi alvokas ĉiujn membrojn de Andaluza Esperanto-Unuiĝo por ĉeesti kaj partopreni Ĝeneralan Asembleon de ĉi tiu asocio, kiu okazos la 18an de julio 1994, je la 16.30 horoj en la sidejo de la 53a Hispana Kongreso de Esperanto (Avenida de los Guindos 48, Malago, Hispanio) por pritakti la jenan tagordon:

Legado de la akto de la antaŭa kunveno.

Bilanco de la Asocio.

Modifo de membrokotizoj.

Perkorespondaj kursoj.

Aliaj kursoj

Esperanto en biblioteko

Filatelo

Turismo

Monate ĉe Vi

Gazeto Andaluza

Informoj de grupoj kaj izolitaj membroj

Nia Asocio kaj Hispana Esperanto-Federacio

Renovigo de la Estraro

Sierra Nevada '95

Petoj kaj Demandoj.

Malago, la 4an de majo, 1994

La Prezidanto de AEU

IJS'94

Hungara Esperanto-Junularo invitas Vin al agrabla somera feriado en internacia esperantista etoso.

IJS 1994 okazos (inter la 15a kaj la 21a de julio) en belega hungara urbeto Kőszeg, ĉe la aŭstra-hungara limo, ĉe piedoj de montaro apartenanta al Subalpoj. La urbo troviĝas en komitato Vas, 20 kilometrojn for de Szombathely, la centro de la regiono.

Kőszeg havas mem mezepokan etoson kun fortikaĵo, preĝejo kaj romantika urbocentro. La ĉirkaŭaĵo donas abundan eblecon bone kaj utile pasigi tempon. Vi povas dum IJS ekkoni parton de hungara popolarto, historio kaj naturo.



Kompreneble, la organizantaro planas la kutimajn Esperanto-programojn: prelegojn, lingvokursojn. Ĉijare ni deziras organizi *teatran vesperon*, kaj tion, kiel kutimon partonfari de sekvontaj Semajnoj. Bonus, se multaj grupoj prepariĝus per iu skeĉo, sceno aŭ teatraĵo. Povespere Vi povas trovi en la programo Esperanto-kazinon, diskotekojn, bufedon, babilejon, IJS-kuron kaj la tradician balon.

Por la semajno ni ofertas du-tri aŭ ses-ok litajn tranoktejojn. Vi povas pasigi la semajnon en belega studenthejmo proksime al la urbocentro kun grandega parko, sportejoj. Prepariĝu al multaj migradoj sur montojn! La adreso kien Vi venu: Kőszeg, Jurisich Miklós Kísérleti Gimnázium. Por atingi Kőszeg ni proponas al Vi veturi al Szombathely (estas trajnoj el Budapeŝto kaj el Graz), poste trajne veturi al Kőszeg. Ni atendas Vin ĉe la stacidomo de Kőszeg!!!

Pli detalajn informojn pri la pago, programo, teknikaj aferoj Vi povas ricevi de Hungara Esperanto-Junularo (Tibor Budai), H-8901 Zalaegerszeg, pk 263. Sendu al ni Viajn programproponojn, dezirojn, ke ni povu organizi Semajnon por la plej multaj amuza kaj utila!

Bonvenon en Hungariol

Hungara Esperanto-Junularo



Esperanto-TV-Kurso

IEI, tio estas, la Internacia Esperanto-Instituto, planas profesinivelan instrufilmon taŭgan por TV-stacioj. Unue, la plano estis, ke la profesia reĝisoro Roman Dobrzinsky prilaboros jam preparatan scenaron de Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor. Tamen, temis pri projekto 500000 dolara kaj 3-4 jara, kaj Dobrzinsky rezignis pri la projekto.

IEI kaj la ĉefa mecenato, prof. J. Bachrich, petis al la reĝisoro, ke li ne entute rezignu, sed uzante siajn profesiajn eblojn trovu ion pli realigeblan. En septembro de 1993, Dobrzinsky trovis eblon adapti al Esperanto jam ekzistantan instrufilmon de BBC por la angla lingvo, *Muzzy from Gondoland* kaj *Muzzy Comes Back*. Ricevinte la unuan parton, IEI konstatis ke ĝi estas tre bone prilaborita laŭ didaktika vidpunkto. Konsiderante la avantaĝojn (mono kaj tempo), IEI venis al la konkludo, ke en la nuna financa kaj tempa situacio valoras provi.

Mila van der Horts-Kolinska, el IEI, ek esploris la opiniojn de homoj kiuj konas la Muzzy-filmon, interalie pere de la komputila reto Internet. Ŝi petis de Stefan MacGill (de ILEI) kunlaboron adapti ĝin lingve al la jam ekzistantaj scenoj, provante enkonduki en la dialogojn E-enhavon.

La filmo estas profesi-nivela, kaj du reĝisoroj pretas adapti ĝin al la lingvaj kaj teknikaj bezonoj de IEI, eĉ laŭ ties financaj ebloj (espereble, ili sukcesos kolekti 35000 dolarojn). Ĝi ankaŭ taŭgos (laŭ teknika vidpunkto) por uzi ĝin dum TV-dissendoj, sed tiucele IEI devos pagi apartan licencon.

IEI petas kunlaboron de ĉiuj konsciaj Esperantistoj. ELNA en Usono faris esplorojn por produkti instru-filmon, kaj la Dana E-Asocio posedas monon tiucele (ĉu ili ion faris ne estas konate); ankaŭ aŭstraliaj esperantistoj ion planis. Tia kunlaboro permesos kolekti diversspecajn spertojn, antaŭ ol IEI aliros al la projekto *Espero, nia amo* verkita de Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor. Spertojn ekzemple kiomgrade la Esperanto-movado taŭgas por la informado, distribuado kaj vendado de tiaspeca instrumaterialo (videokasedo) kaj por preparo de nacilingvaj versioj de la akompana lernolibro.

La *Muzzy*-projekto permesos kolekti ne nur spertojn, ĝi ankaŭ taŭgos por popularigi la lingvon inter junuloj. Ofte la instrumaterialo por junuloj estas ŝatata ankaŭ de plenkreskuloj, sed ne inverse.

Laŭ kalkuloj de IEI, post apero de vidbendoj, en ne tro longa tempo povos ricevi la investitan sumon kaj eĉ perlabori monon por la pli frua projekto *Espero, nia amo*, kun scenoj pri la E-movado.

Se temas pri la *Muzzy*-projekto, se ĝi ricevos akcepton kaj monan subtenon, ĝi povas esti jam parte preta antaŭ la UK en Seulo, kie IEI montros ĝin dum la *Tago de Lernejo*.

IEI atendas ne nur financon apogon, sed volonte akceptos ankaŭ realismajn opiniojn de ĉiuj pri la projekto kaj ties realigado. Por akceti financon helpon, bonvolu uzi la UEA-konton iein-q.

Zeŭso parolas Esperanton

Ekde la komenco de nia lingvo la esperantistaro sentis la plenumindan deziron traduki. Ĉi tio kompreneblas se oni antaŭscias ke Esperanto ne estis en siaj unuaj jaroj lingvo parolata sed ĉefe legata kaj skribata, pere de gazetoj, korespondado kaj ankaŭ verkaĵoj, ĉu originalaj ĉu tradukitaj. Ĉi tiu emo traduki diferencigis Esperanton de aliaj tiuepokaj internaciaj lingvoj, aŭ eĉ pli modernaj, kies tradukita verkado estas tute nekomparebla al tiu de Esperanto. Eĉ la propra lingvo Volapuk' dum siaj plej sukcesaj jaroj ne posedis tradukitajn verkaĵojn; kontraŭe, kiam Esperanto estis apenaŭ dekelkjaraĝa, ĝi jam havis tradukojn de Goethe, Shakespeare, Puŝkin aŭ Balzac.

Komence, ĉi tiuj tradukoj estis nur lernezercoj kiuj ofte estis sendataj al Zamenhof mem, tiama redaktoro de la revuo *La Esperantisto*, kiu siafoje korektis kaj publikigis ilin. Ĉi tiel estis konataj tradukistoj kiel Grabowski, De Wahl aŭ Meier.

Sed la tradukarto havis ankaŭ en la komenco negativan flankon. Kiam Esperanto ĉesis esti lingvistika ludo kaj definitive fariĝis tagon post tago uzata lingvo, multaj parolantoj riproĉis, ke estus pli bone propagandi dise la lingvon ol traduki verkaĵojn jam sufiĉe konataj de la tuta mondo. Tamen, aliaj opiniis, ke Esperanto nur venkos kiam ĝi estos literatura lingvo. Ĉi tiel, en la dudekaj jaroj jam estis tradukitaj verkaĵoj en Esperanto el preskaŭ ĉiuj lingvoj, eĉ poemoj el indiĝenaj lingvoj kiel la keĉua

aŭ la guarania.

Komence de la jarcento la esperanto-tradukistoj turnis sin ankaŭ al la senmortaj klasikaj verkoj, ĉu latinaj, ĉu grekaj. En 1895, la rusa Kofman tradukis kaj publikigis la unuajn kantoj de *La Iliado*, ĉefverko de la greka klasika literaturo kie oni kantas la aventurojn de la Troja milito; la traduko estis tre bone konsiderata de la tiuepoka kritiko, kiu asertis ke la stilo kaj tradukmaniero distingiĝis per arta simpleco kaj viva klareco, konservante la versan ritmon de la klasika verko.

En 1906, Henri Vallienne tradukis *La Eneidon*, epopeo kiu rakontas la forfuĝon el Trojo de la heroo Eneo. Bedaŭrinde, ĉifoje la opinioj ne estis tre favoraj, oni kritikis ĝian malbonan ritman senton de la traduko, kiu misformis la verkon. Kelkaj jaroj poste, ĉi sama tradukisto publikigis *La Metamorfozojn* de Ovidio, laŭverse tradukitajn, kiuj ricevis tre favorajn esprimojn de la tiuepokaj gazetoj.

Post ĉi tiuj unuaj tradukoj ni devas atendi ĝis la jaro 1933, kiam oni publikigis la grandan verkon *Oduseias*, tradukita de W.J.A. Manders. En ĝi, Homero kantas la revenon en sian hejmon de la greka heroo Odiseo, Uliso, laŭ la latina formo. En ĉi tiu verko, la tradukanto preferas anstataŭ konservi la versan formon, traduki en prozo kaj tiel adapti ĉion al Esperanto.

Tradukitaj kaj publikigitaj la tri plej gravaj klasikaj ĉefverkoj antaŭ la Dua Mondmilito, okaziĝos en 1960 la sekvanta tradukado de klasika verko. La prestiĝa kaj fruktodona eldonejo *Stafeto* de nia memorata Juan Régulo, publikigis en tiu jaro la verkoj *Reĝo*

Edipo kaj Antigona, tradukitaj rekte el la klasika greka de Douglas B. Gregor, kiu aldonis enkondukon kaj abundajn notojn.

La plialtigo de la nivelo de la esperanto-tradukantoj kaj sendube la pli facilaj teknikaj eblecoj por publikigi provokis, ke ekde 1980 la tradukoj de latinaj kaj grekaj verkoj estis nombraj. Inter la tradukistoj elstaras Albert Goodheir, kiu en 1981 tradukis la *Apologion de Sokrato* de la greka Platono; en 1982, la teatr-verkon de Eŝilo *Prometeo Ligita*, tre rekomendinda se oni deziras ĝui kun la greka teatro kaj la Esperanto traduko; la prestiĝa eldonejo *Fonto* publikigis en Brazilo lian tradukon de *Enkonduko en la kategorioj de Aristotelo*, de Porfirio la Fenica, kiu temas pri la logiko de tiu fama filozofo. En la lastaj jaroj Goodheir publikigis *Trojaninoj kaj Ifigenia en Taŭrido*, de la teatr-verkisto Eŭripido.

La plej fruktodona tradukisto dum la lastaj jaroj estas la akademiano Gerrit Berveling, nederlanda pastro kaj profesoro, kiu pere de la eldonejo VoKo publikigis en 1988 la verkon de Lukiano de Samosato *Lukio aŭ azeno*, humura rakonto pri homo transformita en azenon (poste, denove eldonita de *Fonto*). Sed Berveling preferas traduki el la latina, kaj tiel en 1991 publikigas *Da mav' estos neniam satl*, de Marcialo, morde satiraj poemetoj de la plej klasika majstro de epigramo. Same en tiu jaro li tradukis *Romaj Odoj* de Horacio, unu el la plej famaj poeziaj verkoj en la latina



lingvo.

Fine de la okdekaj jaroj li publikigis *Oktavia*, de la andaluz-romia Seneko, tragedio pri la edzino de la imperiestro Nerono. Ankaŭ de la kordova Seneko en 1991, li publikigas en 1991 *Konsolo al sia patrino Helvia*; poste, en tiu sama jaro, li tradukis *La Fragmentoj* de Heraklito, postrestintaj citaĵoj de la fama antaŭsokrata filozofo.

Seneko, ankaŭ estas tradukita de alia fama aŭtoro, István Ertl, kun la verko *Pri feliĉa vivado*, traktaĵo elmetanta la opiniojn de stoikisto pri feliĉa vivado.

Lastatempe, sendube la plej elstara traduko estis tiu de la verko *La Respubliko*, de Platono, kiu meritos pli taŭgan studon en alia onta artikolo ene de ĉi revuo. Ĝi ĵus eldoniĝis en Aŭstralio, traduke de Donald Broadribb.

Sed Zeŭso parolas hodiaŭ Esperanton en Andaluzio. Ĉar fine de la jaro 1993, nia samideano J.F. Martín publikigis en la oceania revuo *Esperanto sub la Suda Kruco* sian

tradukon de la verko *Aŭkcio de Vivoj*, de la klasika aŭtoro Lukiano de Samosato. Poste, ĉi traduko estas sendepende publikigita. La tradukanto mem en kurtaj linioj antaŭparolas pri la aŭtoro, situante la verkon en la epoko kaj prezentante Lukianon. Li estis kabeita filozofo kiu pretendis diskonigi siajn malfavorajn kritikaĵojn kontraŭ filozofio kaj ĉefe kontraŭ la filozofoj.

Kutime, Lukiano prezentas ilin kiel personojn kiuj nur ludas per kripta lingvaĵo, ankaŭ kiel ridindajn ulojn malproksimajn al

la reala vivo, loĝante ofte en sia nereala universo. Tra la paĝoj pasas elstaraj filozofoj kiel Sokrato, Diogeno, Heraklito, ktp., en aŭkcio pere de kiu oni diskonigas la bazojn de ilia instruado, ekzistante nur kiel daŭraj roluloj la aĉetantoj, Hermes, la aŭkciisto, kaj la propra Zeŭso, kiu ĉion prezidos.

La tradukanto aldonas nombrajn notojn, kiuj klarigas lingvistikajn aspektojn de la originala verko kaj la traduko, kaj biografiajn aŭ historiajn detalojn.

Malfacile estas traduki el lingvo al alia, kaj malfacilege devas esti traduki el unu el la plej antikvaj lingvoj, la klasika greka, al la plej moderna, Esperanto. Tamen, malgraŭ ĉi malfacileco, la prezentita traduko aperas tute komprenebla, elstarante la belecon de iuj dialogoj kiel la jena_

Aĉetanto: Kio (estas) la homoj?

Heraklito: Dioj mortemaj.

Aĉetanto: Kaj kio la dioj?

Heraklito: Homoj senmortaj.

Aldone, la verkaĵo prezentiĝas en tre bone prezita kajero de 11 paĝoj, facile legeblaj. Ni esperas ke ĉi tiu estos nur la unua verko tradukita de nia samideano, kiu sendube trovos en la ampleksa greka kaj latina literaturo aliajn bonajn tradukindajn verkojn.

J.M.R.H.



Financa raporto de AEU (31-12-93)

Enspezoj		Elspezoj	
Favora saldo laŭ antaŭa bilanco	266200	Poŝto	24983
Ordinaraj Kotizoj	92385	Revuoj	3400
Instruado	68065	Ĉe papervendejoj	3639
Rentumoj	77	Fotokopioj	30616
Redonoj	890	Mercero	329
Jarenspezoj	161417	Ŝparkaso	735
Entute	427617	Kasedoj	8050
		Cizojo	19562
		Surbendigilo	5995
		Ĉe librovendejo	55632
		Komputila materialo	8623
Jarelspezoj			161564
Saldo favora			266053
Caja Postal de Ahorros			144788
Unicaja			120621
Kaso			644
Entute			266053

Spekulaciistoj

El *Plena Vortaro de Esperanto*: Spekulacii. Negoci, esperante profiton nur el hazardaj okazoj. Mi malkovras nenion, se mi diras, ke la malbona situacio de la lando, de nia lando Hispanujo, estas kaŭzo de la agado de la spekulaciistoj. tion mi jam legis en la gazetaro kaj ĝin aŭdis per aliaj informaj medioj. Precipe kiam rilatas al la borso kaj al aliaj financaj institucioj. Ĉiam kiam estos problemoj en tiuj sektoroj de nia enlanda ekonomio, oni informas nin: la kulpo de la nuna situacio en la borso estas de tiuj spekulaciistoj. Nu, ni havas la fakton, ke ni jam konas la kulpantojn. Kion oni faras por meti rimedon al tiu situacio, por ke ĝi ne ripetiĝu? Laŭ mia modesta opinio, oni metas nenian solvon, kaj la afero ripetiĝas denove kaj mil fojojn pliajn. Aliflanke, *Borso*: (laŭ *PIV*) estas: Ejo destinita por financaj aŭ komercaj spekulacioj... Nu, nia pompa socio baziĝas sur tiuj institucioj financaj kaj ekonomiaj. Ĝia rezulto jam estas videbla. Do, kial ni plendas?

Vi jam scias, ke ĉi tiu lando konsistas el personoj, kiuj havas abundan monon kaj aliaj havas preskaŭ nenion aŭ nenion, krome meze de tiuj du kategorioj troviĝas aliaj civitanoj, nek riĉaj, nek malriĉaj. Nu, nia inteligenta sociordo inventis ejon, kie la sinjoroj, kiuj havas monon, povas leĝe spekulacii per sia mono, ĉiam cele pligrandigi sian bankokonton. Evidente tiu monludo ĉiam estas sentata en la dua aliaj civitanaj kategorioj, kiuj sen nenia kulpo devas pagi la amuziĝojn de la grandaj sinjoroj. La afero estas

komparinda al tiuj specialaj ejoj, kie oni povas ĝin plimultigi, nome mi aludas la kazinojn. Kaj tia estas la situacio. Vi jam aŭdis diri, per la diversaj komunikiloj, ke kiam la borso troviĝas en malbona situacio, katastrofa ekonomio estas antaŭvidebla. Antaŭ tiu anoncita ekonomia tutlanda katastrofo, mi ne havis eĉ duron en mia poŝo. Poste, kiam la situacio normaliĝas, ankaŭ mi ne havas eĉ duron en mia poŝo. Resume, la sinjoroj posedantaj monon ludis, spekulaciis laŭ propra intuicio kaj por propra celo. La resto de la popolo iom gape aŭskultas la rezultojn de tiuj financaj ludoj, kvankam diversmaniere estas ĝi kiu suferas la konsekvencojn de tiuj borsaj spekulacioj.

Sed pli grave estas, ke kiam okazas tiuj situacioj, la informaj medioj kaj eĉ la registaro mem ne hezitas kulpigi la spekulaciistojn. Kaj nun venas la momento, kiam mi nenion komprenas, laŭ logika vidpunkto jen: se certe oni scias, ke la spekulaciistoj kulpas pri tiu katastrofa situacio, kial oni permesas al ili agadi? Kial oni permesas tiujn instituciojn, kies celo estas la monludo? kaj, kiam oni anoncas la spekulaciistojn kiel kulpantojn, kial oni ne anoncas iliajn nomojn? Ĉu ili estas fantomoj? Nu, tia ja estas la situacio en nia socia sistemo.

Mi ne scias, ĉu iam ni kapablos nin organizi surbaze de egalrajteco, aŭ daŭre funkcios tiuj privilegiuloj, kiuj sub strangaj longatempe ekzistantaj leĝoj rajtas ludi per la ekonomio de la lando.

En nia socio, eĉ la plej modestaj malriĉuloj revas al amasigo de mono. Do, la ŝanĝo por vera kaj justa sociordo estas tre malfacila.

Luis Serrano Pérez

Esperanta PEN-Klubo

La Esperanto-literaturo estas io viva kaj fruktodona kaj okulfrape ĉiuj monatoj aperas en nia transnacia socio novaj literaturaĵoj, ĉu originale verkitaĵoj en la internacia lingvo, ĉu tradukitaĵoj. Sed bedaŭrinde apud la nekonado de nia lingvo mem, ekzistas malkono de la Esperanto-literaturo, pri kio multfoje eĉ ni mem, esperantistoj, kulpas.

Tamen fojfoje okazas grandaj kaj gravaj agnoskoj, la lasta el ili okazis ĉi tie en Hispanio, kadre de la Mond-Kongreso de PEN-Klubo en Santiago de Compostela. PEN-Klubo estas internacia asocio kiu unuigas verkistojn de preskaŭ la tuta mondo, ĝi estis kreata en Britio en la dudekaj jaroj, kaj inter siaj celoj, diskonigitaj pere de la PEN-Ĉarto, troviĝas favorigi la rajtojn je la libera verkado kaj esprimo. La strukturo de ĉi tiu asocio baziĝas je la ekzisto de diversaj naciaj aŭ teritoriaj asocioj, kie grupiĝas verkistoj de diferentaj landoj aŭ malsimilaj lingvoj; kurioze, Hispanio mem ne havas landan sektion, sed ja ekzistas kataluna, eŭska aŭ galega kluboj.

Nu, en 1991 naskiĝis la Esperanto PEN-Centro, kiu konsistas el dudeko da profesiaj verkistoj kaj ĵurnalistoj prezidataj de István Némere, kiu suskribis la PEN-Ĉarto. En 1993, konkrete la 10-an de septembro, Giorgio Silfer, oficiala observanto de la Esperanta PEN-Centro, prezentis ĉe la ĝenerala asembleo, renkontiĝita en Santiago, oficialan proponon por akceptigi la Esperantan sektion de la Internacia PEN-Klubo. Post longa debato, dum kiu Silfer devis komprenigi ke Esperanto estas ankaŭ kultura lingvo por arta produktado, la ĝenerala asembleo voĉdonis favore al la akcepto de la Esperanto-PEN-Sekcio, per 29 favoraj voĉdonoj, 13 sindetenaj kaj 4 kontraŭaj, inter ĉi lastaj, la japana kaj angla sekcioj.

Kelkaj el la kontraŭaj argumentoj esprimis siajn dubojn pri sekcio ne teritorie definita, tamen antaŭe jam estis oficiale agnoskitaĵoj aliaj sekcioj kiel la cigana aŭ la jida, kies lingvoj ne apartenas al iu konkreta teritorio aŭ lando. Laŭ vortoj de Silfer, Esperanto estas pli ol movado de filantropaĵo, unika socia fenomeno, nome kvazaŭ diaspora lingva minoritato, kaj la Esperanta PEN-Centro estas parto de la intelektularo de ĉi tiu diasporo.

Kiu rajtas aparteni al ĉi nova sekcio? Nu, la principoj de la PEN-asocio asertas ke al ĝi nur povas aparteni profesiaj verkistoj, t.e., personoj kies ĉefa viv-rimedo estas la literaturo. Jen sendube unu el la plej gravaj paŝoj por nia lingvo en la lastaj jaroj. Kaj la sekva paŝo? Tre simple, laŭ vortoj de Silfer atingi la Nobel-premion pri literaturo fare de originala verkisto en Esperanto. Ĉu vi pensas ke tio ne povus okazi? Nu, oni jam vidos...

J.M.R.H.

E = mc²

La Trafiko, konsiderata kiel la homa agado kiu konsistas en la transporto de homo kaj/aŭ varoj tra la aŭtovojoj, posedas tri elementajn faktorojn: la Homo, la Veturilo kaj la Vojo. Ĉi tiel se oni deziras perfektigi la trafikion, t.e., atingi sekurecon en kiel eble plej rapida kaj malmultekosta transporto, estas necese perfektigi ĉi tri faktorojn.

Konsiderante rekte la trian elementon, t.e., la aŭtovojoj, ĉiutage oni aŭdas plifoje en la amas-medioj la koncepton *inteligenta aŭtovojo*-n. Kio estas

ĉi tio? Nu, temas pri pliperfektigi la vojojn laŭ du flankoj: sekureco kaj informado.

Rilate la sekurecon, forviŝi la tiel nomataj *nigraj punktoj* aŭ lokoj kie abundas la akcidentoj. Konstrui vojojn pli rektaj, pli solidaj kaj kun diferencaj kaj apartaj vojoj.

Rilate la informon, atingi aktualan kaj kompletan informon pri la diversaj mezuroj de la Trafiko, t.e., pri la rapideco, pleneco de la vojo kaj okupado de la veturilo.

Ĉi informojn oni povas atingi per diferencaj kanaloj. Unue, en la vojo mem, pere de televid-kameroj kaj aliaj sensoriloj; due, pere de aŭtomobiloj kapablaj kapti ĉi konitaĵojn kaj trie, pere de trafik-patroloj sur la vojo aŭ per helikopteroj super ĝi kiuj sendas la informojn per radio-elsendejoj. Ĉi konitaĵoj, necesaj por atingi sekurecon kaj rapidecon, oni sendas al la nomataj *kontrolcentroj*, kiu dum la tuta tago laboras por tio. Nuntempe ekzistas ĉi kontrolcentroj en Madrido, Barcelono, Valencio, Malago kaj Seviljo, kaj krom intenci faciligi kaj fluigi la trafikon, supozas konstantan helpilon por la aŭtomobilistoj, kiuj povas kontakti rekte kun ĝi pere de la t.n. *fostoj-SOS*, tra kie oni povas demandi helpon, ĉu mekanika ĉu medicina, aŭ simple peti informojn pri vojoj, komunik-linioj, ktp.

Ĉi help-fostoj SOS ekzistas nuntempe en diversaj hispanaj vojoj; en Andaluzio, konkrete troveblas en la vojoj N-IV, Aŭtovojo de Andaluzio, Madrido-Kadizo; A-92, Aŭtovojo Seviljo-Malago; Aŭtovojo Seviljo-Huelvo kaj Ĉirkaŭvojoj de Malago kaj Seviljo, kaj estas facile videblaj ambaŭflanke de la vojo proksimume ĉiu du kilometroj kaj tre karakteriza pro sia oranĝa koloro.

Chema Rodríguez

Esperanto Aplikata

Interŝanĝas uzitajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. J. Manuel Alonso de Arco, C.P. *Prácticas n-ro 1*, Rodríguez Rubí 1, E-29008 Malago, Hispanio.

Desegnojn kaj pentraĵojn verkitajn de ŝi mem vendas Ángeles Salazar Blázquez, c/ Rosa, Edif. Jaén, 1-2^a D, E-29010 Malago, Hispanio.

Esperanto en Poŝto kaj Telegrafo, José Matos de Castro, Poŝtkesto 980, E-18080 Granado, Hispanio.

Esperantistaj Radioamatoroj. Kontakto EB7 FOK. Poŝta adreso, José Matos de Castro, Poŝtkesto 980, E-18080 Granado, Hispanio.

Hostal' *La Hispanidad*, Explanada de la Estación, bl. 5, Malago, Hispanio. Tel. (95)2311135.

Interŝanĝas uzitajn hispanajn poŝtmarkojn kontraŭ aliaj uzitaj alilandaj. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Tradukoj el la franca kaj la kastilia en Esperanton. Andrés Martín, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Mi vendas loĝejon en Malago, en kvartalo Carretera de Cádiz, 4a etaĝo, kvar ĉambroj, kuirejo meblita, enmuraj ŝrankoj, blendita pordo, ĉio alumina. La loĝejo disponas propran telefonon. Prezo 6.600.000 pesetoj. Kontakto ĉe 958-258134 (de la 8a ĝis la 10a), 95-2315337. José Matos de Castro,

Correos Entrega Inmediata, E-18070 Granado, Hispanio.

Modoj, desegnoj, pentraĵoj. Skribu al Raquel Martín Tovar, Armengual de la Mota 33, 4a D, 29007 Malago.

Survoje, dumonata revuo de UNIKO. Tre interesaj artikoloj de esperantistaj gravuloj. Vi povas komenci la abonon iam ajn. Peranto en Hispanio, Andrés Martín González, Poŝtkesto 3275, E-29080 Malago, Hispanio.

Kosmo-Infano, sondisko de Solo. Prezo 800 pesetoj. AEU, poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.

Oficialaj tradukoj el la angla hispanlingven. J. F. Martín, Poŝtkesto 5184, 29080 Malago. Ankaŭ tradukas el la franca kaj germana en esperanton aŭ en la hispanan. Tradukoj prilaboritaj per komputilo kaj presitaj altkvalite.

Anoncu senpage en *Gazeto Andaluzia* vian komercan aŭ profesionan agadon. Sendu al Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio, vian anoncon.

Parolu pri niaj senpagaj anoncoj al esperantistoj kaj neesperantistoj. Per tio vi helpos pliigi la prestiĝon de Esperanto kaj ties Movado. Ĉiutage kreskas la nombro de samideanoj kiuj gajnas monon per nia internacia lingvo.

Ĉina entrepreno de mineralakvaj proditaĵoj serĉas modernan mialakvaĵan

muntoĉenon, biermuntoĉenon, sukuntoĉenon. Ankaŭ serĉas kunlaboron tutmonde. Skribu en Esperanto al la tradukisto: S-ro Vang Bing, Meicheng, Qianshan, Anhui, CN-246300 Ĉinio.

Komerca fakgrupo *La rollagro* produktas kaj liveras radialajn rollarojn kun globetoj, radialajn rollagrojn kun globetoj kaj ekstera sfera ringo, radialajn rollagrojn kun cilindraj roloj, radialajn-aksajn rollagrojn kun cilindraj roloj, lagrojn kun rollagroj, globetojn. Komerca fakgrupo *La rollagro*, Platforma Industriala Scheia, R-5800, Suceava, Rumanio. Telefono: 0040/987/22452, telefakso 0040/987/25947.

Solvebla kafo. Po ladoskatolo 200 kr, minimuma mendo 20FTj (27360 litroj); pago kontraŭ kreditletero. BRANCO PERES Ltda, Av. Rio Branco 1108, CX Postal 282, CEP 17800-000, Adamanatina, Brazilo. fakso (0189) 21-3232 kaj 21-3316.

En la printempo de 1994 estas planata la CD-ROM-versio de la multlingva fervoja terminaro (kun i.a. Esperanto), prizorgita de la Internacia Fervoja Unuiĝo (UIC). Ĝi havas diversajn serĉeblojn kaj estos ligebla al aliaj komputilaj programoj. Informoj: UIC, fakso +33/1/44492059.

Kudrado (i.a. de afrikaj vestaĵoj). Kikulu Mukeba Bertin, B.P. 4083, Ngagara, Bujumbura, Burundio.

Pola Radio: programinformilo pri la esperant-lingvaj elsendoj haveblas ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, PL 00-950, Varsovio, Pollando.

Serĉas kontaktojn kun filatelkomercistoj kaj butikistoj havantaj intereson pri aĉetovendo. Maria Smigiel, ul. Bronikowskiego 3m2, PL-85426 Bydgoszcz, Pollando.

30.08.-06.09.94 okazos Unua Internacia Esperanto Renkontiĝo en Odeso (Ukrainio). Petu la aliĝilon ĉe S-ino Popova Tamara, str. Jakir 51/76, UKR-270072, Odeso (Ukrainio); tel. (0482)692694.

Esperanta Internacia Asocio de Deklaristoj en Dogano estis fondita en kadro de Matadia Esperanto-Centro. Celoj: traduki internaciajn dogandokumentojn esperanten; enirigi Esperanton en internacian komercon. Kunlaborantoj kaj subtenantoj (unualoke el Eŭropa Komunumo) estas bonvenaj. Provizora sidejo: B.P. 211, Matadi I, Bas-Zaire, Zaire.

Seula Esperanto-Kulturcentro volas intersanĝi Esperanto-librojn kontraŭ libroj aŭ Esperantaĵoj el Koreio. Iuj, kiuj interesiĝus bv. turni sin al SEK. Dir. LEE Jung-kee, CPO kesto 3047, Seulo, Koreio.

Mineralakva fabriko, produkta valoro 20 milionoj da usonaj dolaroj jare, serĉas kunlaborantojn kaj investantojn por modernigo de la muntadaj ĉenoj. S-ro Fang Rui, Kuangqian-shuigonshi, Tianzhushan, Qianshan, CN-240000 Anhui, Ĉinio. Tel. 05668-22988.

Ni proponas ŝanĝi literaturon (ruslingve, germane, france, hispane, esperante). Esperanto-klubo, str. 60 let Oktjabrja 6, RUS-626440, Niĵnevartovsk, Rusio-Siberio.

Miaj ofertoj: novaj teknologioj kaj novaj produktoj: sporta aparato, sukeraĵo,

artadekora materialo el ligno kaj eĉ pli interesaj novaĵoj. Tenjakov Evgenij Vasiljeviĉ, Timirjazeva strato 1a/8; RUS-662800 Minusinsk, Krasnojarska regiono, Rusio.

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) planas la produktadon de Esperanto-TV-kurso. Se vi interesiĝas pri tiu projekto, skribu al Internacia Esperanto-Instituto (IEI), Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando; tel. +31.70.3556677.

Elektu de 250 Esperanto-Kunvenoj. Kiel kutime, la printempa duobla numero de *Heroldo de Esperanto* enhavas liston de feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto. La listo por 1994, en kiu aperas datoj, adresoj kaj programoj, priskribas ĉ. 250 aranĝojn en la tuta mondo. Oni povas senpage ricevi la koncernan duoblan numeron petante ĝin ĉe la redakcio (Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (To), Italio).

Iĝu apoganto de KCEI

Malfermu ŝparkonton ĉe la fondaĵo Gastejo Edmond Privat por minimume unu jaro! Nia ŝparkaso daŭre funkcias. Por ekscii pli pri la kondiĉoj, kontaktu KCE/GEP, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Kiu povas kaj volas helpi la eldonon de la plej unua Esperanto-lernolibro por uzbeklingvanoj kaj la Uzbeka-Esperanto-Rusa Konversaci-libro? Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano.


Laborperado en Germanio: Ĝis nun nur la oficialaj instancoj (Arbeitsämter) havis

permeson por laborperado. Tio baldaŭ ŝanĝiĝos. Antaŭvideblas ke ek de somero 1994 ankaŭ privataj entreprenoj rajtos peradi laboron. Ili ĉefe okupiĝos pri laboristoj / dungistoj kiuj posedas altan kvalifikon. Perado ne nur eblas por germanoj, sed ankaŭ por interesuloj el aliaj landoj de la Eŭropa Komunumo. La situacio rilate al interesuloj el aliaj landoj ankoraŭ ne estas klara. Verŝajne ili nur rajtos peti la servon de privataj laborperantoj, se ili pretas akcepti laborpostenon, por kiu ne eblas trovi laboriston el Eŭropa Komunumo. Informoj ĉe *Monda Merkato*, Pf 1539, D-82355 Weilheim, Germanio.

Vere ĝui la faman Tokajan vinon eblas nur en Tokaja vinkelo. Mi proponas gustumi ĝin en nia familia vinkelo. Dum via restado en Hungario nepre organizu ekskurson al Tokaj, kie en la vinpremuzeo kaj vinkelo *Hímesudvar* serĉu la esperantistan dommastrinon! Vi ĝuos specialan vinon kaj specialan priservon! Por niaj vizitantoj mi volonte helpas aranĝi ankaŭ tranoktadon, manĝadon kaj interesajn programerojn. Margh Várhelyi, Bem út 2, H-3910 Tokaj, Hungario.

Kiel verki Esperantlingvan tekston per via vortlaborilo *WordPerfect 5.1*? Helpe de *ZAMENHOF.WPK* vi povos entajpi iun ajn esperantlingvan tekston rapide kaj facile. La fajlo haveblas ĉe J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, E-29080 Malago, Hispanio. Prezo 750 pesetoj, plus sendokostoj.

Aperigu vian anonceton senpage sur ĉi tiuj paĝoj! Sendu ĝin al nia adreso, *Gazeto Andaluzia*, AEU, Poŝtkesto 864, E-29080 Malago, Hispanio.



Nevadmontaro, Granado, Hispanio

R E Z O L U C I O D E U N E S K O

XI.4.4218

(Dua rezolucio favora al Esperanto)

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de la Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-Movado, kaj precipe de Universala Esperanto Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝia partopreno en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjarigon de la ekzisto de Esperanto,

1. Gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. Petas la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. Invitas la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjarigon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. Rekomendas al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjarigo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

(Akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko la 8an de novembro 1985)

-----000000-----